# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 2 Februaro, 2015




*Kara Leganto, dum la lasta tempo mi ofte cerbumas, ĉu nia kara lingvo estas ligita al iu kontinento, lando kun mondgrava lingvo? Pasintjare en Argentino – lando de la tango, okazis unu el la plej malmultenombraj UK en la historio de Esperanto, ne pli ol 700 aliĝintoj. Nun, al la jubilea 100-a UK en Lillo jam aliĝis pli ol 1900 gesamideanoj, kvin el kiuj estas membroj de nia E-societo. Fine de 2014 ekagis E-istoj el franclingva Kebekio por gastigi UKon-2017 en Kanado. Post tio, kiam nia E-societo sendis konvinkan leteron je subteno de tiu evento, reeĥis aliaj E-kolektivoj el Kanado (Toronto, Ottavo), Usono (Teksaso, Kalifornio). Tio ĉi denove pruvas, ke E-on bezonas ne angla-hispana-lingvanoj, sed francoj, germanoj, japanoj (3 ŝtatoj kiuj kutime sendas al UK la plej grandajn delegaciojn), slavoj. Nome pri tio ni parolos post kelkaj tagoj dum nia februara kunveno.*

*Kaj en ĉi numero vi trovos resumon de prelego de nia prezidinto Humberto Perez pri tekniko (metodo), kiun li uzadas dum la lastaj 15 jaroj, pri planataj eventoj en Usono kaj Francio, pri la nova por-Esperanta anglalingva libro.*


*Fariĝu membro de la nia Societo, subtenu nian bultenon "Saluton!". Anticipe dankon.* –La Redakcio

## Emocia Liberec-Tekniko



Mi ekuzis Emocian liberec-teknikon (ELT) ĉirkaŭ dek kvar jarojn, kiam havis multajn san-problemojn kaj vizitis kuracistojn senĉese, ne observante iujn plibonigojn. Iam mi eklegis artikolojn pri alternativa medicino kaj ELT frapis la okulojn. Tre skeptike mi ekuzis ĝin, sed je la unua provo mi havis pozitivajn rezultojn. Do mi daŭrigis pristudi ĝin kaj ĝian uzadon. Mi komencis uzi ĝin ĉe mia laborejo kun plenkreskuloj kaj infanoj, posedantaj kaj stomakdoloron kaj emociajn traŭmojn.

ELT estas unu el la meridianaj teknikoj bazitaj sur principoj de tradicia orienta medicino kaj okcidenta psikologio. ELT estis kreita de usona inĝeniero Gary Craig en la 90-aj, bazita sur la tekniko de d-ro Roger Callahan. ELT iam estis nomata "akupunkturo sen pingloj" aŭ "emocia versio de akupunkturo". Baza ELT proceduro enhavas stimuladon de certaj premad-punktoj, fokusigante atenton je la aspekto de la problemo. ELT estas uzata en stato de angoro kaj ekscitiĝo, fizika doloro, fobioj, dependeco, sendormeco, obsedantaj pensoj kaj aliaj psikologiaj kaj fizikaj simptomoj. Ĝi ankaŭ povas esti uzata por atingi la celojn per celkonscia eliminado de negativaj emocioj kaj sintenoj, kiuj malhelpas fari tion. En la libro "Emotional Freedom Techniques" oni atentas je la sekvaj trajtoj de teknologio: (a) la baza procedo estas facila por lerni kaj uzi; kaj (b) alta efektiveco kaj rapideco de la rezultoj. Tio ĉi permesas kontroli funkcion de ĉi tekniko post mallonga prov-aplikado.




Mia sano komencis plibonigi al la punkto, ke mi ĉesis viziti kuracistojn ekde ĉirkaŭ la jaro 2000. Mi devis uzi okulvitrojn de kiam mi estis sep-jarulo kaj anstataŭ havi mian vidkapablon malaltigitan kun aĝo, ĝi pliboniĝis. Nun mi uzas okulvitrojn nur nokte aŭ por rigardi malproksimen, sed neniam por legado.

Mi povas diri, ke mi estas tute libera de sanproblemoj kaj ne visitis kuraciston dum la longa tempo. Se mi komencas senti simptomojn de malvarmumo aŭ de ajna alia problemo, mi tuj ekfrapetas kaj la pozitiva rezulto venas tuje.

*–Humberto Perez*

# NASK revenas al Nord-Karolino

En 2015 NASK revenos al la Universitato William Peace in Raleigh, Nord-Karolino, kaj ĝi kunigos la fortojn kun Kino-Teatro-Festivalo (KTF) por liveri esceptan eventon, eble, la plej priparolatan en la historio de la kursaro!

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) estas unika intensa enmerga programo en Esperanto kiu altiras studentojn kaj profesiajn instruistojn el la tuta mondo. Dum sia 45-jara historio, NASK okazis en multaj lokoj: en San-Franciska Ŝtata Universitato ĝis 2002, School for International Training (SIT) en Brattleboro (Vermonto) en 2002-2006, kaj en la Universitato de Kalifornio en San-Diego en 2007-2011. Ekde 2012, ĝi vojaĝis kun usonaj landaj kongresoj al diversaj lokoj: al Universitato de Teksaso en Dalaso en 2012, al Universitato William Peace en Raleigh (Nord-Karolino) en 2013, kaj al Universitato de Viktorio (Kanado) en 2014. Ĉi-jare NASK revenas al la bela verda kampuso de Universitato William Peace en Raleigh por liveri plian neforgeseblan sperton!

La unuaj kvar tagoj de NASK'2015 koincidos kun la dua Kino-Teatro-Festivalo (KTF), post la granda sukceso de la unua KTF pasintaprile en Vaŝingtonio. Aldone al la kutimaj NASK-aktivaĵoj, okazos posttagmezaj amuzaj kreaj metiejoj, por lerni, ekzemple, la bazojn de filmado kaj helpi al partoprenantoj fari sian propran videon.

NASK okazos ekde **la 30a de junio ĝis la 9a de julio 2015** (KTF: ekde la 30a de junio ĝis la 5a de julio). Paul Gubbins, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de multaj verkoj, inkluzive de la videa kurso "Esperanto - Pasporto al la Tuta Mondo", instruos la superan kurson. Lee Miller, profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo, instruos la meznivelan kurson, kaj Ĵenja Bondelid ("Helena" el "Esperanto - Pasporto al la Tuta Mondo"), koregrafo kaj balet-instruistino, gvidos la komencintan kurson. Oni povas enskribiĝi por la tuta programo (plena NASK + KTF, 8 tagoj) aŭ nur por la unuaj kvar tagoj de la evento (NASK + KTF, 4 tagoj). La bazaj prezoj varias ekde $175 (sen loĝado, 4-taga programo) ĝis $735 (plena prezo, kun loĝado kaj manĝado, 8 tagoj). Aliĝu ĝis la 15a de aprilo por ricevi la plej bonan prezon!

# Nova E-libro de Olaf Egeberg

The human family has never been so interconnected. Commerce, communication, and the media and travel have all helped us become the global people we are quickly becoming. But where is our common language? For too long Esperanto has been the second language choice for only a small number of people. But now globalization is happening in a big way and pressing on us to be more effective in bringing Esperanto out of its present limited use to come into its full promise as a language for the planet, and that means everyone who wants to communicate across our language barriers. Surely that's what Zamenhof wanted it to be.

Here, now, is a document that facilitates that radical development. Its title is "Coming Home" and it's a book about our personal and social evolution and the role Esperanto plays in all this. The book highlights this evolution and provides spark to hasten it along – because it's time.

It's time because after 150,000 years of having our species being divided and held apart by different languages, it's finally time to transcend those barriers so we can talk to one another. It's time because the shrinking of our world is intensifying, and our interconnectedness as a global family is intensifying, too, forcing all non-Esperanto speakers (like myself) to see, more than ever, our need for a common tongue. This book, "Coming Home," ignites that awakening, and provides the information needed to have these next few years be our "Esperanto Moment," world-wide.

A great number of teachers and tutors are going to be needed now, I believe.

See for yourself: **http://www.changesahead.net/theBook**

# Jara Programo en Kastelo Greziljono

2015-apr-03/08: Renkontiĝo de Interkant' kaj kunkantado kun La Kompanoj
2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut
2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)
2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso
2015-aŭg-01/08: Lingva semajno, Lingvofestivaleto, tuj post UK
2015-aŭg-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj
2015-oktobro: AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a.



*Por la aŭgustaj semajnoj aŭ poste, ni bonvenigas viajn proponojn por instrui vian lingvon aŭ Esperanton, por prelegi/koferenci aŭ por animi aktivaĵojn por infanoj. Skribu al* ***bertox@free.fr***

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.**
**1350 N. Wells St., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**24an de Februaro** – Les Kordylewski "Ĉu lingva ĥaoso minacas Usono?"

**24an de Marto** – Amy Alexander rakontos…

**28an de Aprilo** – Temo estos anoncata

**26an de Majo** – Temo estos anoncata

**28an de Junio** – Tradicia kluba pikniko